

„Somero“ – plej nova filmo de Kirill Serebrennikov (2018):

Filmo pri kaj por la libereco Kiel Ruslando de Putin memorigas la iaman sovetian tempon

Simbola kritiko pri la Putin-reĝimo fare de nova filmo de Kirill Serebrennikov
akompanita de nova skandalo pri persekutata artisto

De Andreas Künzli (Svislando)

„Leto“ (somero) estas nova filmo de la renoma rusa reĝisoro **Kirill Serebrennikov** pri la legendecaj sovetiaj rokmuzikistoj de la 1980aj jaroj. En la centro de la biografia omaĝo staras **Mike** kaj **Viktor**, kiuj estas la ĉefaj protagonistoj de la politike subpremita sovetia rokribelo kun ties muzikgrupoj, adorantoj kaj amikoj, kiuj enkondukis la rokmuzik-kulturon en Sovetunion.

En la realeco temas pri **Miĥail Naumenko (1955-91)**, nomita Mike, kiu estis konata rokmu-
kisto, stelulo de la leningrada roksceno kaj agnoskata fakulo pri okcidenta rokmuziko. Li ludis en la grupo „Aquarium“ kaj poste fondis la grupon „Zoopark“, kiu celebris la stilon de „New-Wave“. La alia heroo, **Viktor Coi (1962-90)**, kiu posedis kultan statuson kaj estis komparita kun Kurt Cobain, la usona ikono de la „Gruge“-stilo, fariĝis la plej populara sovetia popkantisto, kies unika kariero kulminis en la neforgesata rokgrupo „Kino“.

Laŭ inspiro de la muziko de David Bowie, Lou Reed, Iggy Pop, Sex Pistols, Led Zeppelin, Talking Heads, Marc Bolan, Blondie, Bob Dylan, Rolling Stones k.s., kies diskoj estis pludonitaj inter personaj amikoj kaj ŝatantoj de la rokmuziko, en Leningrado estiĝis alternativa muziksceno, kiu allogis interesatan publikon, kiu vizitis la koncertojn de sovetiaj rokmuzikistoj. En Sovetunio rokmuziko estis konsiderata kiel dubinda ĝenro kaj limigis sin precipe al Leningrado. Nature, ĉio, kio estis malpermesita, estis interesa. Por tamen eviti la ekzistadon de rokmuzikistoj en la kontraŭleĝa subtero, kiu devis esti persekutata de la komunisma partia ŝtato, estis fondita la Leningrada Rok-Klubo, en kiu membris dekoj da rokmuzikaj grupoj kaj kiu organizis ĉiujaran rokmuzikan festivalon.¹ La nova muziksceno estis observita ankaŭ de la suspektemaj okuloj kaj oreloj de la ŝtataj organoj, precipe Komsomolo kaj KGB, kiuj ŝajne lasis la rokmuzikistojn pli malpli libere fari, kondiĉe ke ili limigis siajn koncertojn al la duonprivata sfero aŭ malgranda publiko. La koncertoj devis aspekti serioze por eviti la impreson de dekadenca punk-orgio de la „senfutura“ generacio, sed prefere por prezenti sendanĝeran bard-kantadon sen provoka enhavo. El politika-ideologia vidpunkto troa entuziasmo pri la muziko de la „klasmalamiko“ ne estis dezirinda, sed en la unikaj koncertoj de la rokklubo la homoj tamen ne hezitis montri siajn sentojn kaj emociojn.

La rakonto de la filmo okazas en Leningrado dum somero de la jaro 1981, do jarojn antaŭ la glora tempo de „perestrojko“ kaj „glasnosto“ de Miĥail Gorbaĉov, kiu liberigos Ruslandon de la „stagna periodo“ de la komunisma diktaturo de Breĵnev. Pli precize temas en tiu loza biografia komedio pri la personaj rilatoj inter la 26-jara Mike Naumenko kaj ties bela edzino **Natalja** kaj la alloga, iom introvertata 19-jara aziano Viktor Coi, pri kiu Nataŝa raviĝas post sia konatiĝo kun li.

La nigra-blanka filmo komenciĝas per amuzaj libertempaj scenoj ĉe la sovaĝa plaĝo de la maro apud Leningrado, kie Mike ludas la kanton „somero“, kiun liaj amikoj gaje kunkantas. Du muzik-komencantoj, Vitja (Viktor Coi) kaj Leonid (prototipo de Aleksej Rybin), aperas kun siaj gitaroj ĉe la plaĝo, kie ili renkontiĝas kun Mike kaj ties amikoj. Por Vitja, kiu aŭtoris kantojn por iu muzikgrupo sen nomo, estas grave ekscii la fakan opinion de pli sperta muzikisto, precipe Mike, pri la propra laboro kiel kantisto. Vitja kaj Lenja prezentas la kantojn „Miaj amikoj“ kaj „La pigrulo“, kiuj evidente plaĉas al

¹ Tiu rokklubo estis fondita en marto 1981 en la „Domo de la popola kreado“ (strato Rubiņštejn 13) kiel unua klubo de tiu speco en Sovetunio. Ĝi fariĝis la lulilo de la sovetia rokmuzika sceno. La klubo disponis pri salono kun ĉirkaŭ 200 sidlokoj kaj estis laŭ sia karaktero unika miksaĵo de kulturdomo kaj muzikasocio kun specialaj „labor“-ĉambroj por kunlaborantoj de KGB, KPSU kaj Komsomolo. En 1983 la klubo unufoje organizis festivalon, en kiu partoprenis pluraj diversaj grupoj, kiuj apartenis al la klasikuloj de la sovetia rokmuziko. Komence de la 1990aj jaroj la Leningrada Rok-Klubo estis fermita pro la granda konkurenco en la muzika branĉo. En 1992 la KGB-eksgeneralmajoro Oleg Kalugin konfirmis, ke la aktiveco de la Leningrada Rok-Klubo estis „aŭspiciata“ de KGB. (Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Leningrader_Rockclub, precipe la rusan version).

Mike, kiu donas konsilojn por plibonigi ilin. Do, al Vitja oni prognozas sufiĉe brilan estontecon kiel kantisto. Dum la festo Vitja neeviteble konatiĝas kun Nataŝa, la edzino de Mike, kiu rimarkas ilian alproksimiĝon, sed ŝajne indiferece reagis al la neatendita ekamikiĝo de sia amatino al tiu ĉarma junulo.

Dum la reveturado de la grupo en antaŭurba trajno eksplodas provoka kverelo kun iu ĉagreniĝinta pasaĝero – eble alkoholulo aŭ speciala agento – kiu laŭte arogas esprimi sian malŝaton al tiaj longharaj junuloj, kiuj kantas laŭ li kantojn de la ideologia malamiko, Usono. Subite aperas la orda polico, kiu krude mistraktas unu el la ĉeestantaj rokmuzikuloj, kvankam li faris nenion malbonan. Kvazaŭ kiel venĝo al la sanga bato, kiun li ricevis kontraŭ sia faŭko, okazas imagata kantado de la kanto „Psycho Killer“ de la usona grupo „Talking Heads“, kiu celas transdoni sian elektran energion al la inertaj sed mirigataj kunveturantoj. Komenciĝas tumulto, iu tiras la urĝan bremsan kaj post la halto de la trajno la kantisto estas forkondukita de la kunlaboranto de la sekurecaj organoj.

Poste, Vitja vizitadas la hejmon de Mike kaj Nataŝa por aŭskulti okcidentan muzikon kaj elprovi kaj pridiskuti proprajn kantojn. Mike kaj Nataŝa gvidas kun ties bebo sufiĉe normalan, eĉ banalan kaj ŝajne feliĉan familian vivon en la modestaj kondiĉoj de komuna loĝejo en la malantaŭaj kortoj de Leningrado (kie cetere iam vivaĉis kaj huliganis ankaŭ la aktuala rusia prezidento Vladimir Putin). La reciprokan simpatian inter Vitja kaj Nataŝa Mike evidente rimarkas tamen sen aludi ĝin en la komunikado kun Vitja. Kiam Nataŝa iom embarase esprimas la deziron kisi Vitja-n, Mike ne kontraŭas ŝian deziron kaj donas al ŝi tiun liberecon. Sendepende de la amikeco inter Vitja kaj Nataŝa, la amo de la geedzoj evidente malvarmiĝas, ĉar Mike plene dediĉas sin al sia laboro kiel muzikisto, helpante ankaŭ la karieron de la rokmuzikisto Bob (prototipo de Boris Grebenŝĉikov), kiu intencas produkti propran diskon.

En sekvanta sceno, kie la energio de la rokmuziko estas transdonita al la pasaĝeroj, Vitja kaj Nataŝa veturas en urba tramo, kie aŭdiĝas la melodio de la kanto „La pasaĝero“ de Lou Reed.

Kiam la grupo de Vitja kandidatiĝas por esti akceptita de la oficiala rokmuzika klubo, li devus deklari siajn kantojn satirismaj. Sed li rifuzas fari tion per la atentigo, ke liaj kantoj traktas seriozajn temojn kiel seksajn kontaktojn kun ŝanĝiĝantaj amor-partneroj, pigrecon kaj alkoholismon kaj aliajn sociajn problemojn, kiuj en Sovetunio estis aktualaj, sed grandparte tabuitaj de la socio kaj politiko.² Tamen, seksajn scenojn oni ne vidas, kaj rilate tiun prudecon la filmo estas tute sovetieca, kompare ekzemple kun „Matilda“, kiu estis pli okcidenteca tiurilate. Laŭ la eksmoda direktorino (ĉu parodio de Alla Pugaĉova?) de la rokklubo, la „sovetia rokmuzikisto devas okupi aktivan socian pozicion“. Vitja fajfas pri tiu rolo, sed lia kolego tamen konsentas pri la plenumo de „socia kritiko“.

La junaj rokmuzikistoj kaj ties amikoj ofte renkontiĝas en la loĝejo de Mike kaj Nataŝa, kaj la grupoj de Mike kaj Viktor koncertas de tempo al tempo en la urba rokklubo, kie oni vidas ankaŭ pli kaj pli entuziasman direktorinon apud la skeptikaj mienoj de la observemaj partiaj funkciuloj.

Mike konsilas al Vitja produkti veran Rock´n´Roll-muzikon, sed li hezitas fari tion kaj serĉas sian propran vojon.

Kiam la tamburisto Oleg devas servi en la armeo, restis nur du gitaristoj en la grupo. Kiam Vitja prezentas kun sia kolego la kanton „Iam vi estis ´beat´-ulo“, li sukcesas konvinki la publikon dum sukcesa koncerto. La grupo de Vitja fariĝas pli kaj pli populara.

Iam Vitja tamen konatiĝas kun alia virino, Mariana, kiu fariĝos lia edzino kaj helpas organizi liajn koncertojn.

...

Muziko

La filmo utiligas la muzikon de la grupo „Zveri“ de Roman Bilyk kaj aliaj rusaj rokmuzikistoj. La kanto „Psycho Killer“ de la usona grupo „Talking Heads“, kiu flegis la stilon „post punk“, estis realigita de Aleksandr Gorĉilin. La kantojn „The Passenger“ de Iggy Pop kaj „Perfect Day“ de Lou Reed ludis Anton

² Ĉi tiujn tabuojn rompis ankaŭ la fama filmo „Malenkaja Vera“, kiu en 1988 estis la plej populara filmo en Sovetunio.

Sevidov kaj Elena Koreneva. La solan originalan kanton de la grupo „Kino“ oni aŭdas en la postfina parto de la filmo, kiu enhavas la indikojn pri la kunlaborantoj.

Produktado kaj prezentado en la kinejoj

La filmo estas rakontita laŭ la memoroj de Natalja Naumenko-Razlogova, la eksedzino de Mike, kaj efektivigita laŭ scenaro de la aŭtoroj **Miĥail kaj Lili Idov**. Ĝi estis produktita de **Ilja Stewart**, naskita en 1986 en Moskvo, kie li laboras kiel produktisto de filmoj. En lia studio „Hype Productions“ Serebrennikov lasis produkti jam iun antaŭan filmon.

La produktado de la filmo komenciĝis en julio 2017 en Sankt-Peterburgo kaj daŭris ĝis la fino de aŭgusto. La 23an tago de ĉi tiu monato Serebrennikov estis subite arestita, ĉar la justico riproĉas al li financan fraŭdon, kaj sendita al hejma arestado en Moskvo (vd. sube). En februaro 2018 la malhelpata reĝisoro tamen sukcesis prilabori la filmon per komputilo, kiu ne estis ligata kun la interreto, ĉar ĉia komunikado kun la ekstera mondo estis malpermesita al li. Surbaze de la reĝisoraj notoj kaj pli fruaj ekzercoj estis produktitaj ankaŭ pluraj teknikaj scenoj. Tiel, la produktado de la filmo estis finita en printempo 2018 en la hejma aresto de la reĝisoro, kaj la vendado de la rajtoj komenciĝis dum la Berlina Filmfestivalo de tiu jaro.

„Somero“ festis sian gloran premieron en la 9a de majo 2018 kadre de la 71a Internacia Filmfestivalo de Cannes (Francio). En la kinejoj de Ruslando la filmo estis videbla en junio, en Germanio kaj Svislando en novembro.

Idearo

Serebrennikov nomis sian filmon „somero“, kiu estas metaforo por libereco. Pri la baza ideo de sia filmo la reĝisoro mem klarigis: „Mi faros tiun filmon por kaj pri generacio, kiu konsideras la liberecon persona, sole ebla decido. Mia celo estas fari tiun veran valoron de la libereco pli klara“. Do, esence temas pri filmo pri la problemo de la libereco. Sed la nebuleca nigra-blanka lumo de la bildoj simbolas la sinistran grizecon de la sovetia tempo, kiam ajna espero je pli libera vivo estis nura iluzio. La filmo rakontas pri junularo en vakuo kaj rande de inerta socio, oscilanta inter ribelado, sopiro je libereco kaj amo unuflanke kaj vivado sub la naŭzaj kondiĉoj de la totalisma politika diktaturo kaj cenzuro aliflanke. Kvankam la filmo ludas en Sovetunio, ĝi povus en principo ludi ankaŭ en nuntempa Ruslando, kiu ŝajne refalis en malnovajn tempojn kaj kie la libera arto denove estas subpremata, cetere de la samaj iamaj KGB-agentoj, kiuj postvivis la komunismon, de kiu ili formale liberiĝis, por regi la landon. Povas esti, ke la pli profunda intenco de la filmo de Serebrennikov do ĝuste estas ripeti la ideon de la protesto kontraŭ la subpremado de la libera kulturo dum la regado de Putin, la iama KGB-oficiro, kiel tion faris kompareblaj nekonformismaj filmoj dum la sovetia tempo, kiuj tiam estis rigore subpremitaj de la komunisma partio kaj povis esti publike montritaj nur en la pli libera tempo de la perestrojko kaj glasnosto.³

La subpremado de la liberaj kulturo kaj arto efektive daŭras en Ruslando ĝis nun, se oni pensas ekzemple pri la persekutado de la muzikistinoj de la grupo „Pussy Riot“⁴, pri la antaŭnelonge okazinta kondamno de la rap-muzikisto „Husky“⁵ aŭ pri la publika histerio kontraŭ la filmoj „Matilda“⁶ kaj „Morto de Stalin“⁷, ĉar laŭ la opinio de oficialaj ruslandaj potenculoj la protagonistoj de tiuj artkreaĵoj „ofendis religiajn sentojn“ aŭ okupiĝas pri „sekso, drogoj kaj protesto“ (tiel Putin la 20an de decembro

³ Eble kiel plej fama ekzemplo de sovetia filmo, kiu estis mistraktita de la sovetia cenzuro kiel „kontraŭ-historia“ scenaro, menciindas la elstara filmo „Andrej Rubljov“ (1966) de Andrej Tarkovskij, kiu estis montrita en Cannes en 1969 malgraŭ sovetia protesto: en sia plena, nekripligita versio la filmo povis esti prezentita nur en 1987.

⁴ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Pussy_Riot#Urteil.

⁵ La rusa rap-muzikisto Husky estis arestita kun sekva lanĉo de jura proceso kontraŭ li (vd. <https://www.srf.ch/sendungen/tagesschau/deutliche-worte-aus-bruessel-umbau-bei-abb-maenner-und-krebs> (sesa kontribuajo); <https://deutsch.rt.com/kurzclips/81368-putin-uber-schaedliche-rap-musik>). Fakte, la rapisto estis arestita post kiam li spontane aranĝis surtstratan koncerton post kiam la aŭtoritatoj malpermesitan oficialan koncerton en Krasnodar. Li estis kondamnita pro „huliganismo“ (vd. <https://www.bbc.com/news/world-europe-46309271#>). Surbaze de la premo flanke de aliaj artistoj li devis esti liberigita pli frue.

⁶ Vd. <http://www.planlingvoj.ch/Matilda.pdf>.

⁷ Vd. http://www.planlingvoj.ch/Morto_de_Stalin.pdf.

2018), kio tute ne plaĉas al ili, kaj do „subfosis la socian ordon“ de Ruslando aŭ simile. Tiuj ekzemploj estas nur kelkaj fame konataj kazoj sur la pinto de la glacimonto. Ho, kiel maltolerema estas tiu Ruslando! La timo pro kelkaj tiaj nekonformismaj artkreaĵoj estas absurda kaj ilia malpermeso estus en la libera mondo neimagebla! Do, principe nenio nova en Ruslando kompare kun Sovetunio. Ruslando pruvas, ke la subpremado de la socio kaj kulturo povas ripetiĝi ankaŭ sen komunismo. Ŝajnas, ke la inerta amaso ne rimarkas ĝin aŭ rilatas indiferece al ĝi.

La enŝovitaj kromfilmetoj (kies apudtekstoj estas malfacile legeblaj, ĉar la filmo pasas kun rapida dinamiko), povas esti komprenataj kiel alvoko, ke oni neniam rezignu pri propraj idealoj (kiel la libereco) aŭ perdu la propran personecon eĉ en socio de limigita libereco, kie la regantoj provas subpremi tiujn idealojn kaj personecojn. Tia alvoko do havas daŭran, eternan kaj universalan validecon, kaj en Sovetunio 1981 kaj en Ruslando 2018.

„Somero“ nomiĝis ankaŭ unu el la diskoj de Coi.

Film-kritiko

Ĝenerale, la filmo „Somero“ de Kirill Serebrennikov rikoltis miksatan kritikon, nome pli negativan en Ruslando kaj pli pozitivan en Okcidento, sed pro diversaj kialoj. Koncerne la enhavon, la rusa muzikisto *Boris Grebenŝĉikov*, kiu estis atestanto de la koncerna tempo, en kiu la filmo kaj ĝiaj scenoj ludas, kritikis la filmon, kiun li konsideras „mensogo de la komenco ĝis la fino“, ĉar li opinias, ke „ni vivis alimaniere, pli interese“ ol sugestite en tiu filmo, en kiu Grebenŝĉikov aperas kiel Bob. *Andrej Tropillo* nomis la reĝisoron „homo de fremda rokkulturo kaj sen kono de ĝi“. *Aleksej Rybin* kritikis la scenarskripton kaj malpermesis al ĝiaj aŭtoroj utiligi la emblemon de la grupo „Kino“. Ankaŭ la muzikkritikisto *Artemjy Troickij* opiniis, ke la scenarskripto estas „tre dubinda“, kvankam li favore rilatas al la verko de la reĝisoro kaj li mem. Al li ne plaĉis la „amhistorio, kiu staras en la centro de la verko, kiu fakte ne ekzistis aŭ eble ekzistis nur en ies fantazio“. Pro tio la „grado de la kredindeco ne estas alta“. *Vitalij Kalgin*, aŭtoro de biografio pri Viktor Coi,⁸ konstatis, ke „la filmo „tute ne temas pri Coi, sed pri junaj muzikistoj kun aliaj nomoj“ kaj atentigis, ke la karaktero de Coi estas tordata.

Eĉ se tiuj kritikoj eble estis pravaj, ili tamen maltrafis la intencojn de la reĝisoro. Iamaj proksimuloj de Viktor Coi kaj Mike Naumenko, kiujn ili persone konis en la 80aj jaroj, inter alie Natalja Kruzanova (t.e. Natalja Naumenko-Razlogova), Igor „Iŝa“ Petrovskij (amikode Mike kaj Nataŝa Naumenko), Aleksandr Donskich (muzikisto de la grupo „Zoopark ĝis 1987), Olga Slobodskaja (sekretariino kaj administrantino de la leningrada rokklubo ekde 1985) tamen laŭdis la filmon. Se percepti ĝin fabelo, vojaĝo tra songomondo, tia interpreto de la verko kaj intenco de Serebrennikov trovis vastan aprobon, ĉar neniu atendis, ke li faros filmon, kiu reale reproduktos ĉiujn faktojn de la biografio de Mike Naumenko kaj Viktor Coi aŭ rakontos la realan historion de la leningrada rokklubo. Grigorij Knjaŝev, analizisto ĉe „RockCult“, konfirmis, ke Serebrennikov „sukcesis fari ion neeblan kaj fari bonegan filmon pri la rokherooj“ de la tiama tempo, eĉ se la scenoj tendencas al malprofundeco, kiel opiniis iuj aliaj recenzintoj.

Koncerne la sugestitan amhistorion de Natalja kaj Viktor Coi, la vidvino de Naumenko klarigis en intervjuo kun la gazeto *Argumenty i fakti* (2018), ke ilia rilato signifis teneran amikecon, pri kiu Mike ne havis kialon ĵaluzi. Kvankam li patreze zorgis pri sia fileto, li ne havis apartan rilaton al la malgranda infano. Ankaŭ inter Mike kaj Coi ne ekzistis speciala amikeco. La rilatoj estis tiuj de instruisto kaj lernanto, kiu bezonis la opinion de Mike. Koncerne la loĝkondiĉojn, Natalja rakontis, ke Mike laboris kiel gardisto kaj Natalja kiel hejtistino, kio permesis al ili ricevi oficialan ĉambron en komuna loĝejo en la kvartalo Borovaja. En tiu loĝejo ofte kolektiĝis gastoj kaj vizitantoj. Krome ŝi emfazis, ke Mike ŝatis Sankt-Peterburgon, kiun li neniam nomis Leningrado, kaj kutimis promenadi. Dum Mike trinkis bieron, Coi malofte konsumis alkoholon.

La germana gazetaro plimulte pritaksis la novan filmon pozitive, opiniante ke temas pri „inteligenta himno je la senbrida forto de la muziko, amo kaj amikeco“. La recenzanto de la *Bavara Radio* komprenis, ke reĝisoro Serebrennikov ne simple baziĝis rigide je la faktoj, sed li konstruis per sia filmo amaran poezian portreton, kiu celebras la muzikon same kiel la amon, la pasion kaj la alternativan pensadon. Hannah Pilarczyk (*Spiegel online*) parolis pri la „mondo de la bildoj, kiujn Serebrennikov kreis“.

⁸ Vd. sub „utiligitaj resursoj“.

kiuj estas karakterizaj por esprimi la „krea estetikon de la rokmuziko“. Andreas Busche (*Tages-spiegel*) tamen kredas, ke la filmo estas nepolitika. Daniel Kothenschulte (*Berliner Zeitung*) ricevis la impreson, ke la kvalito de la filmo iom suferis pro tio, ke ĝi estis finproduktita sub la malfacilaj kondiĉoj de la hejma aresto de la reĝisoro.

En la internacia taksado la filmo kolektis miksatajn notojn. De la agentejo „Rotten Tomatoes“ la filmo ricevis pritakson de 59 procentoj surbaze de 17 kritikoj kun averaĝa pritakso de 6 el 10 punktoj, kaj la rusa interreta platformo „Megacritic“ donis pritakson de 7,4 el 10 punktoj surbaze de 44 komentoj.

„Somero“ ricevis la Eŭropan Premion de 2018 en la kategorio „plej bona scenara bildo por Andrej Ponkratov. La premion de la kinofestivalo de Cannes por la plej bona sonspuro⁹ ricevis Roma Zver' (t.e. Roman Bilyk) kaj German Osipov. En januaro 2019 Serebrennikov ricevis la premion „Blanka elefanto“ de la „Gildo de kinologoj kaj kinokritikisto de Ruslando“ kiel plej bona reĝisora laboro pro la filmo „Somero“.¹⁰

Restas la demando, ĉu tia filmo povas vekti intereson en Okcidento kaj ĉu ĝi entute estas komprenebla tie. Mi havas miajn dubojn. Eĉ por la plej junaj generacioj en Ruslando la temo estas verŝajne fremda. Do, ĝin plene ĝuas unuavice homoj, kiuj konscie travivis tiun tempon, tiun kulturon, en Sovetunio, kaj iomete tiu malgranda publiko en eksterlando, kiu havas aliron al tiu kulturo.

Mike Naumenko kaj Viktor Coi ankaŭ estis apenaŭ konataj en Okcidento, kompare kun nomoj kiel Vladimir Vysockij, Bulat Okudĵava kaj Alla Pugaĉova.

Viktor Coi kaj lia grupo „Kino“

Viktor Robertoviĉ Coi naskiĝis la 21an de junio 1962 en Leningrado kiel filo de kore-devena patro el Kazahio kaj rusa patrino. En 1974 Coi fondis kun Maksim Paskov sian unuan muzikgrupon nomatan „Palata n-ro 6“. En 1979 li komencis mem verki rokkantojn. En 1980 Coi estis eksigita de la Serov-Artakademio pro „malbonaj notoj“. Li komencis labori kiel hejtisto en iu ludomo kaj plenumis kantojn dum festoj. Dum iu koncerto li konatiĝis kun Boris Grebenŝĉikov de la konata grupo „Aquarium“, kiu prenis lin sub sian gvidon. En somero 1981 (jaro en kiu ludas la filmo „Leto“) Coi fondis kun Aleksej Rybin kaj Oleg Valinskij la grupon „Garin kaj Giperboloidy“, kiu kelkajn monatojn poste adoptis la nomon „Kino“ kaj estis akceptita de la Leningrada Rok-Klubo, kie la grupo rajtis koncerti. En 1982 aperis la unua studia albumo „45“. Pro rifuzo de la armea servo Coi estis internigita en psikiatria kliniko dum unu kaj duono da monato en aŭtuno 1983. En ĉi tiu jaro „Kino“ publikigis novan albumon, kiu portis la titolon „46“. La grupo pli kaj pli okupiĝis pri politikaj temoj. La kultkanto „Elektriĉka“ temis pri iu viro, kiu sidis en trajno, kiu veturigis lin en la malĝustan direkton – la trajno estis metaforo por Sovetunio, tiel ke al Coi oni malpermesis prezenti la kanton publike. Sed ĝuste ankaŭ pro la politika karaktero de la kantoj Coi kaj lia grupo fariĝis pli kaj pli popularaj. Okaze de la 2a festivalo de la Leningrada Rok-Klubo en 1984 la grupo gajnis la unuan premion, kaj la kanto „Mi proklamas mian hejmon sennuklea zono“ estis rekonita kiel ĉefa kontraŭ-milita kanto de la jaro. Ankaŭ en la 3a, 4a kaj 5a festivaloj de la Leningrada Rok-Klubo de la jaroj 1985-87 „Kino“ kaj Coi ricevis premiojn. En la tempo de la perestrojko kaj glasnosto (sub Miĥail Gorbaĉov) la muzikgrupo atingis pli vastan popularecon pro la kultkanto „Mi volas ŝanĝojn“. La kulmino estis atingita en 1987 per la sepa albumo de „Kino“, nomata „Sangogrupo“, kaj la filmo „La nadlo“, kiu kaŭzis veran „kinomanion“ kaj estis tiam la dua plej bone vendita filmo en Sovetunio. Kelkaj kantoj direktis sin rekte al la sovetia junularo, kiu estis alvokita transpreni la kontrolon pri la socio kaj enkonduki ŝanĝojn en la ŝtaton. Aliaj kantoj estis dediĉitaj al sociaj problemoj. En 1987 Coi konatiĝis kun Natalja Razlogova (edzino de Mike Naumenko), kiu laboris kiel filmkritikistino kaj tradukistino, dum la produktado de iu filmo, dum kiu ŝi funkciis kiel asistento de la dua reĝisoro. Ilia amika rilato daŭris, dum Mariana, kun kiu Coi havis la filon Aleksandro (nask. 1985), estis forlasita de la edzo tamen sen esti divorcita de li. En 1989 *Jurij Ajzenŝpis* komencis produkti la kantojn de la grupo „Kino“ kaj organizis ĝiajn koncertvojaĝojn kaj televidajn elpaŝojn, kiuj diskonigis la grupon en tuta Sovetunio. Coi, kies voĉo ne estis malrekonebla, fariĝis escepta heroo de la sovetia junularo kaj „Kino“ avancis kiel plej populara rokgrupo de la lando. En Francio la grupo prezentis la

⁹ Anglalingve soundtrack, germanlingve Tonspur.

¹⁰ Vd. <https://www.novayagazeta.ru/news/2019/01/12/148286-kirill-serebrennikov-poluchil-premiyu-belyy-slon-kak-luchshiy-rezhisser-za-film-letto>, https://www.gazeta.ru/culture/2019/01/12/a_12125323.shtml, [https://ru.wikipedia.org/wiki/Белый_слон_\(кинопремия,_Россия\)](https://ru.wikipedia.org/wiki/Белый_слон_(кинопремия,_Россия)), <https://unikino.ru>.

albumon „La plej lasta heroo“. Kun Jurij Kasparjan Coi eĉ vojaĝis al Usono por prezenti dum festivaloj la filmojn, en kiuj li ludis. En iu kinofestivalo en Odeso Coi estis agnoskita kiel plej bona aktoro de Sovetunio.

La plej granda – kaj plej lasta – koncerto de „Kino“ okazis la 24an de junio 1990 en la sportstadiono Luĵniki en Moskvo kun 62'000 partoprenantoj. Je tiu okazo oni flamigis la olimpikan fajron. Malgraŭ tiu sukceso Coi daŭrigis labori kiel hejtisto, ĉar li bezonis la gajnitan monon por finansian grupon.

En la tagmezo de la 15a de aŭgusto 1990 Coi perdis en Latvio, kie li feris kaj laboris, la kontrolo pri sia aŭtomobilo kaj kunpuŝiĝis kun aŭtobuso, eble pro laciĝo, malatento aŭ tro rapida veturado. Lia veturilo komplete detruigis, dum li mem pereis en tiu akcidento. Lia morto profunde ŝokis la sovetian junularon; 65 gejunuloj eĉ faris suicidon, ĉar ili kredis, ke ili ne plu povas vivi sen sia idolo. Miloj da homoj ĉeestis lian entombigon en la Bogoslovska-tombejo de Sankt-Peterburgo. En Moskvo troviĝas malgranda memorialo honore al la kantisto. Ĝis hodiaŭ adorantoj metas florojn sur lian tombon kaj ĉe la memorejon.

Postmorte aperis en januaro 1991 la disko „Nigra albumo“. Coi entute verkis 120 kantojn.

En la filmo „Somero“ la rolon de Viktor Coi ludas **Teo Ju**. Ĉi tiu koreo, naskita en Kolonjo (Germanio) en 1981, lernis aktoradon en la Instituto por teatro kaj kino en Novjorko, kiam li havis 20 jarojn en 2001. En 2009 li forveturis al Seulo en Suda Koreio, kie li praktikis sian profesion kaj ludis en kelkaj filmoj.

Mike Naumenko kaj lia grupo „Zoopark“

Miĥail Vasileviĉ Naumenko naskiĝis la 18an de aprilo 1955 en Leningrado. Naumenko studis en lernejo kun intensa anglalingva programo, pro kio li probable ricevis sian pseŭdoniman aŭ artistan nomon “Mike” (Майк). Pri rokmuziko li ekinteresiĝis kiel okjara knabo, kiam li unufoje aŭdis kanton de la grupo “The Beatles”. Aliaj rokgrupoj, kiuj aparte plaĉis al li, estis “The Rolling Stones” kaj “Jefferson Airplane”. Samtempe, li kolektis gazetartikolojn pri “T. Rex”, “The Doors” kaj David Bowie. Kiam li havis 15 jarojn, li komencis ludi gitaron kaj skribis la unuajn proprajn kantojn en la angla lingvo. En la 70aj jaroj li transiris al la rusa lingvo sub la influo de lia amiko Boris Grebenŝĉikov. Post la bazaj lernejoj li vizitis la Ŝtatan universitaton por studi arkitekturon kaj inĝenieradon en Leningrado, sed post kelkaj jaroj li perdis la intereson kaj forlasis la universitaton kaj komencis labori kiel sonteknikisto en la Granda Pupteatro.

Sian muzikan karieron Naumenko startigis en apenaŭ konataj leningradaj rokmuzikaj grupoj kiel “Sojuz Ljubitelej Muzyki Rock” (Unuiĝo de la ŝatantoj de la rok-muziko) kaj “Voĉ-instrumenta grupo honore al Chuck Berry”, kiuj ludis klasikan rokmuzikon de la 50-70aj jaroj. En la dua duono de la 70aj li partoprenis en la konata leningrada grupo “Aquarium” kiel gitaristo. La gvidanto de ĉi tiu grupo estis Boris Grebenŝĉikov.

En somero 1980 Naumenko produktis sian unuan albumon, kiu estis nomita “Sladkaja N kaj aliaj”. Temis pri kolekto de 15 kantoj, kiuj estis produktitaj en la Granda Pupteatro per la helpo de Boris Grebenŝĉikov kaj Vjaĉeslav Zorin. La albumo rapide disvastiĝis en Moskvo kaj Mike Naumenko iĝis konata kiel “Bob Dylan el Leningrado”.

En 1981 Naumenko fondis la grupon “Zoopark”, en kiu li ludis la rolojn de gvida kantisto kaj arta direktoro. Kun sia grupo li vojaĝadis tra Sovetunio kaj partoprenis en la legendeaj festivaloj de la Leningrada Rok-Klubo. Li fariĝis populara probable ĉefe pro tio, ke lia liriko enhavis amason da ironiaj kaj satiraj aludoj, sed en intervjuoj Naumenko kontestis, ke la persono, pri kiu li kantis, estas li mem. La kantoj de Mike ofte estis imitaĵoj de kantoj de Bob Dylan, Lou Reed aŭ T. Rex, sed en la rusa versio li ofte forlasis la originan melodion, tiel ke pri plagiatoj oni ne povis paroli.

En la plej lastaj 80aj jaroj Naumenko alfrontis sanproblemojn ĉefe pro troa alkohola konsumado. Li distanciĝis de la publiko kaj mem izoliĝis. Mike Naumenko forpasis la 27an de aŭgusto 1991 en Leningrado pro cerba sango-infarkto kaŭzita de akcidento en la loĝejo, 12 tagojn post la divorco de sia edzino Natalja, kiu antaŭe forlasis lin. Ili havis komunan filon, Evgenij, kiu laboras ĉe la televido.

Laŭ alia versio de lia morto, Mike ja suferis cerban infarkton, sed sekve al laŭdira rabatako kontraŭ li ekster lia domo. Post tiu incidento Mike ankoraŭ povis atingi sian loĝejon, kie li falis en senkonsciencan staton kaj nur post pluraj tagoj estis trovita. Multaj homoj, kiuj konis lin, tamen ne konfirmis tiun version. Naumenko estis kremaciita kaj entombigita en la Volkov-tombejo de Lenin-grado, aŭ Sankt-Peterburgo, kiel la dua urbo de Ruslando oficiale denove nomiĝis ekde la 6a de septembro de tiu jaro.

La rolon de Mike Naumenko en la filmo “Somero” ludas **Roman Bilyk** (nask. 1977 en Taganrog), kiu mem estas rusa rokmuzikisto, gvidanto kaj kantisto de la grupo “Zveri”. Kvankam li ne estas profesia aktoro, li sendube brile plenumis sian taskon, kiun li ricevis de la reĝisoro persone.

La rolon de Nataŝa Naumenko transprenis la rusa aktorino **Irina Starŝenbaum** (nask. 1992 en Moskvo).

La „kazo Serebrennikov“ kaj la politika dimensio de lia arestado

Post kiam en majo 2017 la loĝejo de Kirill Serebrennikov kaj la oficejoj de la teatrejo „Gogol-Centro“ estis traserĉitaj de la rusa justico, pluraj iamaj administraj responsuloj de la teatra trupo „Sepa Studio“ kaj de la „Gogol-Centro“ (fonditaj en 2012)¹¹ estis arestitaj pro suspekto esti fraŭdintaj ŝtatan subvencian monon. La 22an de aŭgusto Serebrennikov estis mem subite arestita en Sankt-Peterburgo kaj transportita al Moskvo. Lia traktado memorigis kvazaŭ la metodojn de la tempoj de NKVD kaj KGB. La justico riproĉas al li, ke li fraŭdis ŝtatan subvencian monon (en alteco de pli ol 133 milionoj da rubloj, kiuj koncernis la jarojn 2011-14) lige kun iu teatra projekto, kiu ŝajne neniam efektiviĝis.

Interesa estas la momento de lia arestado – nome meze en la tempo de la produktado de la filmo „Somero“. Serebrennikov, kiu ne rajtis forlasi Moskvon – lian pasporton oni konfiskis – devis kvazaŭ sekrete fini sian filmon en la hejma aresto. Li eĉ ne rajtis adiaŭi sian mortintan patrinon.

La arestadon de Serebrennikov, kiu estas ankaŭ populara reĝisoro en okcidenta eksterlando, kie liaj nekutimaj teatraj kaj operaj spektakloj estas montrataj en renomaj teatrejoj, kritikis pluraj mondfamaj artistoj, inter alie Cate Blanchett, Volker Schlöndorff, Lars Eidinger, Elfriede Jelinek, Milo Rau kaj Nina Hoss, kiuj postulis la senpro-krastan liberigon de la reĝisoro. La peticion „Libereco por Kirill Serebrennikov“ (vd. <https://bit.ly/2wJxtav>) subskribis pli ol 54'000 homoj. La franca ministro pri eksteraj aferoj, Jean-Yves Le Drian, skribe petis la rusian prezidenton Vladimir Putin, ke li ebligu, ke la reĝisoro povu veturi al Cannes. Sed la monda premiero de lia filmo „Somero“ devis okazi sen lia ĉeesto.

En Ruslando Serebrennikov estis defendata de konataj kaj renomaj aktivuloj de la kulturo kiel Ĉulpan Ĥamatova, Vladimir Urin, Evgenij Mironov, Fjodor Bondarĉuk, Sergej Jurskij, Aleksej German, Andrej Moguĉij kaj la fama verkisto *Boris Akunin*, kiu vidas esencan rolon de Putin ludi en tiu skandalo. Aliflanke, ekzistas ankaŭ kelkaj konataj artistoj kiel Iosif Kobzon,¹² kiu elpaŝis kiel lojala apoganto de la politiko de Putin, kiuj ne vidis kialon por solidariĝi kun Serebrennikov. La teatra kritikisto Grigorij Zaslavskij tamen opiniis, ke la ŝtataj organoj havas la rajton kontroli la utiligon de la mono, kiun ili disdonis por iuj artaj projektoj. Bone, ili kontrolu.

Serebrennikov mem strikte rifuzis la akuzojn, kiujn li nomis „absurdaj kaj skizofreniaj“. Same kiel la subskribintoj de la menciita peticio, ankaŭ la brita gazeto *The Guardian* supozis, ke ĉe tiu jura afero temas pri malpura ŝmira kampanjo de la Putin-bando kontraŭ kritikaj artistoj en Ruslando, kies voĉoj kaj opinioj estu silentigataj. Sed Dmitrij Peskov, oficiala parolisto de Putin, kaj Vladimir Medinskij, ministro pri kulturo, ekskludis la ekziston de politika kampanjo kaj neis, ke la Kremlo estas envolvata en ĝi. Kompreneble, la kamaradoj de Putin ĉiam rifuzas ĉiujn eksterajn riproĉojn, ĉar ili neniam vidas sin kulpaĵ. Putin mem konfirmis, ke ekzistas la suspekto pri fraŭdo kaj misuzo de ŝtata subvencia mono.

La 17an de oktobro 2018 komenciĝis la jura proceso kontraŭ la responsuloj de la „Sepa studio“, kiuj estis akuzitaj pro fraŭdo de ŝtataj financoj. La 7an de novembro ĉiuj akuzitoj deklaris sin senkulpaĵ.

¹¹ Vd. <https://ru.wikipedia.org/wiki/Гоголь-центр> kaj https://ru.wikipedia.org/wiki/Седьмая_студия.

¹² Cetere, Kobzon forpasis en aŭgusto 2018.

Serebrennikov mem klarigis, ke li havis neniun rilaton al la misutiligo de la laŭdire fraŭdita mono, ĉar pri tio okupiĝis aliaj.¹³

La 9an de novembro la Basmana tribunalo konfiskis la loĝejon, aŭtomobilon kaj monon de Serebrennikov, kiu estas deponita sur bankoj, kaj lia hejma aresto estis longigita ĝis aprilo 2019. En kazo de kondamno, Serebrennikov kaj liaj kunlaborintoj povas esti senditaj en la prizanon dum deko da jaroj.

Sendube, la skandalo ĉirkaŭ Serebrennikov havas politikan dimension. La reĝisoro neeviteble fariĝis objekto de la atento de la Putin-ŝtato, ĉar en la pasinteco li esprimis sin politike kritike pri la pozicio de la Kremlo rilate plurajn aktualajn temojn. Li partoprenis en manifestacioj de civitanoj, kiuj atentigis pri konstituciaj rajtoj,¹⁴ alvokis al la neceso de honestaj elektoj, solidariĝis kun la kartveloj dum la milito de Rusio en ilia lando, postulis la liberigon de la virinoj de la grupo „Pussy Riot“ kaj esprimis sin kontraŭ la malpermeso adopti rusajn orfojn fare de usonaj civitanoj kaj kontraŭ la limigo de la rajtoj de samseksemuloj. Krom tio, li avertis, ke la teatro devas esti libera teritorio, al kiu religiaj instancoj rilatu kun respekto, ĉar temas pri laikaj instalaĵoj. En 2014 li nomis Ruslandon „lando de la senlima sklaveco“, en kiu la homoj malalte taksas la liberecon kaj en kiu ekzistas granda breĉo inter la popolo kaj la nekontrolata registaro. Li konsilis utiligi la ŝtatan monon unuavice por la edukado, klerigo kaj kulturo por „haltigi la katastrofan kreskon de la ignorado kaj obskurismo“. Laŭ Serebrennikov, kiu adoras la iaman korean energion de la tempo de la perestrojko kaj glasnosto de Gorbaĉov, Ruslando „kondukas kiel krimulo de la subkulturo (ruse gopnik¹⁵), kiu freneziĝis“, kaj la regantaj personoj estas „homoj, kiuj volas nenion scii aŭ decidi“. Serebrennikov karakterizis la enhavon de la rusa televido „mensogo kaj propagando“ kaj bedaŭris, ke la homoj en la lando „vivas en televida realeco, kiun ili blinde kredas“. Kompreneble, tiuj opinioj estis forta tabako por la nomenklature de Putin, tiel ke oni ne miras, ke ĝiaj reprezentantoj koleriĝis kaj decidis venĝi tiun ĝenan kritikiston. Estas evidente, ke la Putin-reĝimo, kiun Serebrennikov konsideras „subkulturo de krimuloj“ (Maŝa Gessen parolis pri „mafio-ŝtato“), misuzas la kazon Serebrennikov kiel politikan ekzemplon kaj ostaĝon por ĉikani tiun reĝisoron per juraj rimedoj. Antoni Dolin, rusa filmkritikisto kaj ĵurnalisto, diris en intervjuo kun *Deutsche Welle*, ke la kampanjo por timigi reĝisoron Serebrennikov estas „absolute senprecedenca kaj nekom-parebla brutaleco“ kontraŭ tia artisto. La fama verkisto *Viktor Jeroŝeev*, kiu esprimis sin laŭ simila maniero, parolis pri „evidenta ekzemplo de farsproceso“, kiu per siaj ‘simbolaj’ metodoj trakti tian homon memorigas la stalinisman tempon kun la celo profunde humiligi tiun bravan artiston kaj opoziciulon, kiu aktivis por la homaj rajtoj. Kiu en Ruslando ricevas subvencian monon de la ŝtato, tiu nature aŭto-mate fariĝas ĝia ostaĝo kaj povas fali en ĝian perfidan kaptilon kiel rato, des pli se la koncernata artisto malbone parolis pri tiu ŝtato, kiu toleras neniun kritikon kaj reagis alergie kaj venĝeme en tia kazo, konante neniun pardonon aŭ kompaton. En Ruslando praktike ĉiu (granda kaj malgranda) entreprenisto, kiu ĵon-glas per mono, riskas fariĝi krimulo, ĉar el la vidpunkto de la ŝtato li faris iun eraron aŭ malrespektis iun leĝon. Necesas do atendi pro vidi, kio fine okazos kun Serebrennikov kaj liaj akuzitaj kolegoj.

Andreas Künzli, januaro 2019

¹³ Vd. <https://www.vedomosti.ru/politics/articles/2018/11/07/785827-kirill-serebrennikov-poprosil-ego-doprosit>.

¹⁴ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Strategie_31.

¹⁵ Vd. [https://de.wikipedia.org/wiki/Gopnik_\(Subkultur\)](https://de.wikipedia.org/wiki/Gopnik_(Subkultur)).

Utiligitaj resursoj

Filmo: <https://www.youtube.com/watch?v=0FH9KVkcGyE>

Komenca sceno ĉe la plaĝo dum kantado de la kantado „Somero“:
<https://www.youtube.com/watch?v=XUAeX612WmM>

Sceno en la antaŭurba trajno: <https://www.youtube.com/watch?v=VJONZuckr2A>

Sceno en la tramo: <https://www.youtube.com/watch?v=cYWRP64g1G8>

Sceno en la rokkлубo: <https://www.youtube.com/watch?v=fOMUMMM0Prbs>

Fino de la filmo kaj kantado de la kanto „Arbo“:

<https://www.youtube.com/watch?v=InoMfWynSgM>

Trejleroj: <https://www.youtube.com/watch?v=TvAbtsQKrHA>

Muziko de la filmo „Somero“:

<https://www.youtube.com/watch?v=84OaS2-tNiM>

Grupo „Zveri“ de Roman Bilyk:

<https://en.wikipedia.org/wiki/Zveri>

Gazetaraj artikoloj (germanlingvaj):

[https://de.wikipedia.org/wiki/Leto_\(Film\)](https://de.wikipedia.org/wiki/Leto_(Film))

<https://www.dw.com/de/letto-als-ausdruck-der-sehnsucht-nach-freiheit/a-46158697>

<http://www.spiegel.de/kultur/kino/kirill-serebrennikow-abzubrechen-war-niemals-eine-option-a-1237196.html>

<https://www.cineman.ch/movie/2018/Leto/review.html>

https://www.deutschlandfunk.de/filmkritik-letto-von-kirill-serebrennikow-punkrock-am-ende.691.de.html?dram:article_id=432704

<https://www.dw.com/de/letto-als-ausdruck-der-sehnsucht-nach-freiheit/a-46158697>

<http://www.spiegel.de/kultur/kino/kirill-serebrennikow-abzubrechen-war-niemals-eine-option-a-1237196.html>

<https://www.lifepur.de/inaktiv/weltkino-filmverleih-gmbh/Regisseur-Kirill-Serebrennikowueber-seinen-Film-LETO/boxid/727533>

<https://www.br.de/nachrichten/kultur/film-letto-so-absurd-waren-rockkonzerte-in-der-sowjetunion,R8W7IkJ>

<https://www.bild.de/unterhaltung/kino/kino/letto-rock-rebellion-in-russland-58257828.bild.html>

<https://www.film-tv.ch/pressemitteilungen/2018/letto-exklusiver-clip-zum-musik-film-42744.html>

<https://www.faz.net/aktuell/feuilleton/kino/kirill-serebrennikows-film-letto-im-kino-15882840.html>

<https://www.friedrichsbau-kino.de/filmobjekte/detail/LETO/6751>

Ruslingvaj:

[https://ru.wikipedia.org/wiki/Лето_\(фильм,_2018\)](https://ru.wikipedia.org/wiki/Лето_(фильм,_2018))

<https://www.youtube.com/watch?v=KOn90y3-FWE>

<https://www.youtube.com/watch?v=nT5vxayAPN8>

https://www.youtube.com/watch?v=I5c3l_IuacU

<https://www.youtube.com/watch?v=LFkJwdJKao>

<https://www.youtube.com/watch?v=uziis75sEu8>

https://www.youtube.com/watch?v=RroPs_6v_1k

<https://www.youtube.com/watch?v=Vf23V4oh6ds>

Kiril Serebrennikov:

https://de.wikipedia.org/wiki/Kirill_Semjonowitsch_Serebrennikow

<https://www.youtube.com/watch?v=P1uQDnni7Is>

<https://www.youtube.com/watch?v=9I60ZU8A05o>

<https://www.youtube.com/watch?v=9I60ZU8A05o>

<https://www.youtube.com/watch?v=2wgc7-DKszg>

Дело Кирилла Серебренникова. Воскресный вечер от 27.08.2017

<https://www.youtube.com/watch?v=cnnL7o-lj6I>

Komentoj de Boris Grebenŝĉikov kaj Aleksej Rybin

https://www.youtube.com/watch?v=RroPs_6v_1k

Komento de Artemij Troickij

<https://www.youtube.com/watch?v=RL24G6Zs3gM>

Agantaj personoj:

Viktor Coi:

https://de.wikipedia.org/wiki/Wiktor_Robertowitsch_Zoi

<https://www.youtube.com/watch?v=omwTglnuXt8>

<https://www.youtube.com/watch?v=FU8csnZxdPA>

<https://www.youtube.com/watch?v=1sxSy4tZgwY>

Dokumentaj filmoj pri Viktor Coi (ruslingvaj)

<https://www.youtube.com/watch?v=BYTMMuEhgc>

<https://www.youtube.com/watch?v=4quPkfSIY0g>

<https://www.youtube.com/watch?v=on7zghbQqec>

Kantoj de Viktor Zoi & „Kino“:

<https://www.youtube.com/watch?v=omwTglnuXt8>

<https://www.youtube.com/watch?v=i4eOmYsiGt8>

<https://www.youtube.com/watch?v=RLN5KUTzZc0>

<https://www.youtube.com/watch?v=ZoXLYsrmOK0>

https://de.wikipedia.org/wiki/Wiktor_Robertowitsch_Zoi#Songtexte

https://www.youtube.com/watch?v=4KcMYa0mx_U

<https://www.youtube.com/watch?v=BXgWvFd16I>

<https://www.youtube.com/watch?v=1sxSy4tZgwY>

<https://www.youtube.com/watch?v=ind9EPBzh-Y>

<https://www.youtube.com/watch?v=pfccoSoPY-8>

<https://www.youtube.com/watch?v=GBvAkBCBD0U>

<https://www.youtube.com/watch?v=pLE2ngmVqZY>

https://www.youtube.com/watch?v=K69_m4gtZDk

[https://en.wikipedia.org/wiki/45_\(Kino_album\)](https://en.wikipedia.org/wiki/45_(Kino_album))

<https://www.youtube.com/watch?v=QWWvI7eYqpl>

[https://fr.wikipedia.org/wiki/46_\(album\)](https://fr.wikipedia.org/wiki/46_(album))

<https://www.youtube.com/watch?v=DpLQ1uLJ6ic>

[https://en.wikipedia.org/wiki/Night_\(Kino_album\)](https://en.wikipedia.org/wiki/Night_(Kino_album))

<https://www.youtube.com/watch?v=Erww7TMFscU>

https://en.wikipedia.org/wiki/Nachalnik_Kamchatki

<https://www.youtube.com/watch?v=YsK9v-V6C1s>

[https://en.wikipedia.org/wiki/Blood_Type_\(album\)](https://en.wikipedia.org/wiki/Blood_Type_(album))

<https://www.youtube.com/watch?v=Oy9cB4n24og>

[https://en.wikipedia.org/wiki/The_Needle_\(1988_film\)](https://en.wikipedia.org/wiki/The_Needle_(1988_film)) x

<https://www.youtube.com/watch?v=atyzpu2ITv4>

[https://en.wikipedia.org/wiki/Black_Album_\(Kino_album\)](https://en.wikipedia.org/wiki/Black_Album_(Kino_album))

<https://www.youtube.com/watch?v=ryybRX-AFLg>

Koncerto en Moskvo, 5a de majo 1990:

<https://www.youtube.com/watch?v=bfkKBmfovt8>

La plej lasta koncerto de Viktor Coi, 24a de majo 1990, Luĵniki, Moskvo:

<https://www.youtube.com/watch?v=Cn88IY1ETgY>

Listo de la kantoj de Viktor Coi:

https://ru.wikipedia.org/wiki/Список_песен_Виктора_Цоя

<https://www.youtube.com/watch?v=zHQhQVFgKU4>

Tekstoj: <https://www.g15.ru/coi-viktor.html>

Biografioj:

<https://www.ozon.ru/context/detail/id/31181752>

<https://www.youtube.com/watch?v=gS7tkdF1rxU>

Teo Ju

http://www.aif.ru/culture/person/kto_takoy_teo_yu_kotoryy_sygral_viktora_coya_v_filme_serebrennikova

Michail „Mike“ Naumenko:

https://en.wikipedia.org/wiki/Mike_Naumenko

Kanto „Leto“:

[https://ru.wikipedia.org/wiki/Лето_\(песня\)](https://ru.wikipedia.org/wiki/Лето_(песня))

<https://www.youtube.com/watch?v=jAiGOa-RLvM>

МАЙК Науменко КВАРТИРНИК 1989:

<https://www.youtube.com/watch?v=oPnxTCMjCFQ>

Grupo „Zoopark“

<https://en.wikipedia.org/wiki/Zoopark>

Aquarium (leningrada rokmuzika grupo):

[https://en.wikipedia.org/wiki/Aquarium_\(band\)](https://en.wikipedia.org/wiki/Aquarium_(band))

Boris Grebenshchikov:

https://en.wikipedia.org/wiki/Boris_Grebenshchikov

Roman Bilyk (Roma Zver´):

https://ru.wikipedia.org/wiki/Роман_Билык

Natalja Razlogova:

https://ru.wikipedia.org/wiki/Наталья_Эмильевна_Разлогова

Fotoj de Mike kaj Natalja Naumenko kaj Viktor Coi:

<http://ra-cvet.spb.ru/natalya-naumenko-zhena-majka-foto.html>

https://24tv.ua/lifestyle/tsoy_zhiviy_biografiya_legendi_rok_muziki_ta_tsikavi_fakti_z_zhittya_n602562

Intervjuo kun Natalja Naumenko pri la filmo kaj ŝiaj rilatoj al Viktor Coi:

http://www.aif.ru/culture/person/zhena_mayka_naumenko_u_nas_s_coem_byla_smeyu_nadeyatsya_nezhnaya_d_ruzhba

Intervjuo kun Roma Zver´ (Roman Bilyk) pri la filmo „Leto“:

<https://www.youtube.com/watch?v=GEFi9QC8NiE>

Irina Starŝenbaum:

https://ru.wikipedia.org/wiki/Ирина_Старшенбаум

Libro „Лето Виктора Цоя“ de Jurij Ajzenŝpis (Юрий Айзеншпис):

<https://www.litres.ru/uriy-ayzenšpis/leto-viktora-coya>

Teksto en la interreto:

<https://www.rulit.me/books/viktor-coj-i-drugie-kak-zazhigayut-zvezdy-read-393812-1.html>

https://ru.wikipedia.org/wiki/Юрий_Айзеншпис

Originala muziko de imititaj usonaj rokmuzikistoj:

Talking Heads (Psycho Killer, 1975):

https://de.wikipedia.org/wiki/Talking_Heads

https://en.wikipedia.org/wiki/Psycho_Killer

<https://www.youtube.com/watch?v=O52jAYa4Pm8>

Iggy Pop (The Passenger 1977):

https://de.wikipedia.org/wiki/Iggy_Pop

https://de.wikipedia.org/wiki/The_Passenger

https://www.youtube.com/watch?v=hLhN_oEHaw

Lou Reed (Perfect Day, 1972):

https://de.wikipedia.org/wiki/Lou_Reed

https://de.wikipedia.org/wiki/Lou_Reed

<https://www.youtube.com/watch?v=QYEC4TZsy-Y>

David Bowie:

https://de.wikipedia.org/wiki/David_Bowie

<https://www.youtube.com/watch?v=iYYRH4apXDo>

<https://www.youtube.com/watch?v=tRcPA7Fzwbw>

Led Zeppelin:

https://de.wikipedia.org/wiki/Led_Zeppelin

<https://www.youtube.com/watch?v=D9ioyEvdgk>

Sex Pistols:

https://de.wikipedia.org/wiki/Sex_Pistols

<https://www.youtube.com/watch?v=bucVwI0RfEg>

Marc Bolan, T. Rex:

https://de.wikipedia.org/wiki/Marc_Bolan

<https://www.youtube.com/watch?v=CmsmUyQOdTY>

https://de.wikipedia.org/wiki/T._Rex

<https://www.youtube.com/watch?v=wBBjutLRXyI>

Blondie:

[https://de.wikipedia.org/wiki/Blondie_\(Band\)](https://de.wikipedia.org/wiki/Blondie_(Band))

https://www.youtube.com/watch?v=AV1qKDjyB4Q&list=RDAV1qKDjyB4Q&start_radio=1

Jefferson Airplane:

<https://www.youtube.com/watch?v=Nwi4M30VsdQ>

<https://www.youtube.com/watch?v=24a4NmDAy9E>

Kurt Cobain:

https://de.wikipedia.org/wiki/Kurt_Cobain

<https://www.youtube.com/watch?v=2RBLbcrWLcc>

Koncerne la solvon de la -ata/-ita-demando, mi ĝenerale orientiĝis laŭ la germanlingva modelo (war/wird/wurde depende de la tempo, plej parte pasinteco). Sed la tuta problemo estas komplikata/ita per la dimensioj de la adjektiva, tranzitiva kaj verbaspekta demandoj. Do, restas dubo en kelkaj kazoj (devigita/ata, akompanita/ata, miskompenita/ata, konsiderita/ata, nomita/ata, imagita/ata k.s.), pri kiuj oni povas verve diskuti.

© www.planlingvoj.ch / www.zamenhof.ch, januaro 2019. La (svisa) aŭtoro, nask. en 1962, studis slavistikon, orienteŭropan historion kaj internacian juron en la Zurika universitato. La studojn li finis en 1992 per licencia verkaĵo pri la historio de Esperanto kaj interlingvistiko en Ruslando kaj Sovetunio kaj estis diplomita per la titolo lic. phil. (M.A.). Esperantisto de 1979. En 1988/89 li staĝis du semestrojn en Sovetunio, kie li fariĝis atestanto de la tempo de la perestrojko kaj glasnosto. Retestro de www.osteuropa.ch (ankaŭ: www.balkan.ch kaj www.slavistik.ch).